

Frostiĝinta nazo

el la franca originalo de Aleksandro Dumas
tradukis Edmund Sós (1863-1931), hungara kuracisto,
ekde 1891 vivinta en Vieno
aperis en la aŭstra gazeto La Marto 1911, n-ro 1, p. 12-13

La unuaj tagoj en kiuj St. Peterburgo surmetis sian blankan veston, fariĝis por mi tagoj de stranga okazintaĵo, estis ja ĉio por mi nekonataĵo. Mi ne laciĝis de glitveturado, ĉar granda estas la ĝuo senti sin forrapidigita sur vojo polurita kiel glacio de ĉevaloj ekscititaj de la freŝa aero, kiuj apenaŭ sentantaj la pezon de ilia ŝarĝo, ŝajne flugas pli ol kuras. Tiuj ĉi nunaj tagoj estis por mi tiom pli agrablaj, ĉar la vintro montriĝis nur iom post iom pli kaj pli malvarma, tial ke mi dank' al miaj peltoj, preskaŭ ne rimarkis la altiĝon de l' temperaturo ĝis dudek gradoj.

Unu tagon, kiam la ĉielo estis tre bela, kvankam la aero estis pli freŝa ol mi estis sentinta ĝis nun, mi decidis entrepreni promenadekskurson; mi surmetis grandan astrakanan redingoton, mi enigis mian kapon en peltoĉapon ĝis la oreloj, mi ĉirkaŭkovris mian kolon per kaŝmira kravato kaj kuraĝis iri tiel vestita sur la straton, kovrinte mian tutan korpon, escepte mian nazopinton.

Komence ĉio okazis bonege; mi mem miris pri la malgranda impreso kiun la malvarmo faris al mi kaj mallaŭte mi ridis pri ĉiuj aŭditaj klarigoj pri tio, kion mi devus fari; efektive la tiamaniera aklimatiĝo ravigis min. Sed post iom da tempo ŝajnis al mi, ke personoj, renkontataj de mi, rigardas min kun ia zorgemo, tamen nenion dirante al mi. Sed baldaŭ sinjoro, verŝajne pli parolema ol la aliaj, pasante min, kriis: „Noss!" Ne komprenante eĉ unu rusan vorton, mi pensis, ke tio ne meritas esti haltita pro unusilaba vorto, kaj mi daŭrigis mian iradon. Ĉe la angulo de la strato „Pois" mi renkontis veturigiston pretergalopantan kun sia glitveturilo, kiu malgraŭ la rapidega kurado pensis sin devigata krei al mi de la strato : „Noss, noss!"

Fine atinginte la placon „Amirante" mi staris antaŭ simpla viro, kiu nenion dirante prenis plenmanon da neĝo, ĵetis sin sur min, komencis pli rapide, ol mi povis liberiĝi el lia envolvantaĵo, lavi vizaĝon. kaj per tuta forto frotadi speciale mian nazon. Mi trovis, ke tiu komplezemo estas tre mezvalora, precipe koncernante la tempon, je kiu okazis, kaj tirinte manon el mia poŝo, mi pugno batis lin tiel, ke li estis repuŝata je dek paŝoj;

ĉu feliĉe ĉu malfeliĉe por mi, en tiu momento preterpasis du vilaĝanoj, kiuj rigardinte min dum kelke da tempo, ĵetegis sin sur min, retenadis miajn brakojn spite al mia kontraŭstaro tiamaniere, ke la frenezulo ĵus tiel bategita de mi kaptinte alian plenmanon da neĝo atakis min de nove. Profitante nun de mia nekapableco defendi min, li rekomencis la frotadon. Tamen, kvankam miaj brakoj estis kaptitaj, mia lango ja estis libera; supozante ke mi estas viktimo de iu eraro aŭ perfido mi kriis plenforfe por helpo.

Oficiro alkurinta demandis min francalingve pri mia deziro. „Kiel do, sinjoro, " mi kriis, liberiginte min per lasta mia forto de la tri viroj, kiuj nun kun mirinda trankvileco daŭrigis sian vojon, „vi ne vidas, kion al mi faris tiuj ĉi stranguloj?" — „Kion ili do faris al vi?" — „Ili ja frotis mian vizaĝon per neĝo. Ĉu vi eble ŝatas tion, kiel agrablan komplezemon, precipe en tiu ĉi tempo?" „Ho, sinjoro, ili grandege servis vin", respondis mia kunparolanto. - „Kiamaniere?" — „Via nazo sendube estis frostiĝinta“. — „Ho, mizero!" mi ekkriis, levante mian manon al la minacita korpoparto.

„Sinjoro" — diris pasanto, turninte sin al la oficiro — „mi atentigas vin, ke via nazo frostiĝas." — „Mi dankas, sinjoro," respondis la oficiro, kvazaŭ li estus sciigita pri plej simpla afero en la mondo, kaj klininte sin, li kaptis plenmanon da neĝo, uzante ĝin sur si mem same tiel, kiel ĝin faris ĉe mi tiu bedaŭrinda viro, kies servemon tiel brute mi estis rekompencinta. „Mi vin asertas, sinjoro, ke sen tiu viro vi jam ne havus vian nazon", diris la oficiro, dum li frotadis la sian. — „Tiam, sinjoro, pardonu — — —".

Kaj nun mi postkuris tiun viron, kiu supozante, ke mi intencas mortbati lin, same ekkuregis, tiel ke mi, ĉar timo estas pli rapida ol rekompenco, certe neniam estus atinginta lin, se ne kelkaj personoj, kiuj vidis lin kuregi kaj min persekuti lin, estus kredintaj, ke li estas ŝtelisto, pro kio ili baris lian vojon. Atinginte lin, mi aŭdis, ke li parolas per rapida lango penante komprenigi, ke lia kulpo estis nur trogranda homamo; dek rubloj, kiujn mi donacis al li, klarigis la oferon. La bedaŭrinda diablo kisis mian manon, kaj unu el liaj asistintoj, kiu parolis france, admonis min gardadi de nun pli atenti mian nazon. Lia admono estis superflua; dum miaj pluaj ekskursoj mi ne perdis ĝin el miaj okuloj.